La Nov-Jorkia
ESPERANTISTO

Esperantumado en la Imperia Ŝtato

Volumo 1 Numero 1 Majo 2017

Senkrokodila Semajnfino ĉe Norda-Suda Lago

Raúl García, Esperanto Societo de Novjorko

Norda-Suda Lago kaj sia kampadejo atendas esperantistojn en la Katskil-Montaro (foto de Chuck Heston).

Senkrokodila Semajnfino estas tutsemajnfina evento por ekzerciĝi en esperanta parolado. Kelkaj kunvenoj jam okazis en Nov-Jorkio, ekzemple en la Pen-Jorkia Valo kaj Roĉestro. La venonta semajnfina evento okazos la 3an ĝis 4a de junio ĉe Norda-Suda Lago, kampadejo kaj malgranda lago kiuj troviĝas en la urbeto de Haines Falls en la Katskil-Montaro.

La evento estas por tiuj, kiuj ĝuas la naturon kaj ŝatas kampadi kaj ekskursi arbare.

La kampadejo proksimas al la interŝtata ŝoseo I-87 en la sudorienta parto de la ŝtato. Tie estas atingebla ene de tri horoj de partoj de Pensilvanio, Nov-Ĵerzeo, Konektikuto, Masaĉusetso, Nov-Hampŝiro, kaj Vermonto. Eblas atingi la kampadejon ene de tri horoj kaj duono el urboj kiel Bostono, Filadelfio, kaj Sirakuso.

Mi gvidos du ekskursojn dum la semajnfino: sabaton tagmeze al vidinda pejzaĝo sude de la lago, kaj dimanĉon matene al vidinda pejzaĝo norde de la lago. Partoprenantoj pasigos la vesperon manĝante kaj ludante laŭplaĉe. Necesos memzorgi pri manĝado, sed estas rekomendita kunporti ion por kundividi kun aliaj.

Bedaŭrinde, jam ne plu eblas lui tendumejon por la semajnfino rekte per la kampadejo, sed eblas kunhavi almenaŭ grupon de tri homoj en unu aŭto kaj kun unu tendo. Se vi interesiĝas, sendu mesaĝon al *rauljgarcia@gmail.com*. Eblas ankaŭ renkonti nin por partopreni nur ekskurse aŭ sabaton aŭ dimanĉon se vi sufiĉe proksimas. Pli da detaloj troviĝas ĉe *verdapensaro.blogspot.com/2017/01/senkrokodila-semajnfino-novjorkia.html*.

Kolofono

La Nov-Jorkia Esperantisto raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto Societo de Sirakuso.

Redakcio
Timothy Boronczyk
Zerbie Hynson

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retpoŝte al la redakcia teamo ĉe *novjorkio@syracuseesperanto.org.*

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe *syracuseesperanto.org/novjorkio.*

La kolofona bildo de la unua paĝo montras kastoron, kiu estas la bestosimbolo de Nov-Jorkio. Kastoroj konstruas akvobaraĵon kaj loĝejon en riveretoj. Pro tio, ili estas rigardataj kiel inĝenieroj en la besta mondo. La konstruado draste ŝanĝas la habitaton, ofte plibonigante ĝin por aliaj bestoj. Foto de Robert McGouey / Getty Images.

Esperanto Parolata en Filmo

Timoteo Boronczyk, Esperanto Societo de Sirakuso

En la pasinta somero, amatora film-faristo Preston Wilson komencis filmi novan filmon, *Daisy's Way Home*. Tiu scienc-fikcia filmo rakontas pri Daisy Bell, juna inter-galaksia misiisto de arto, kiu perdiĝis en korupta mondo kaj serĉas la vojon al sia vera hejmo. Wilson trovis la inspiron por sia filmo en la poema verko de William Auld, *La Infana Raso*. Omaĝe, Wilson volis, ke Daisy kaj la aliaj eksterteraj misiistoj parolu Esperanton kaj li petis helpon de la Esperanto Societo de Sirakuso por realigi tiun celon.

Membroj de la Esperanto Societo de Sirakuso kaj la Esperanto Klubo de Roĉestro feliĉe helpis. Mi kaj Zerbie Hynson de Sirakuso, kaj Tomaso Alexander de Roĉestro, tradukis la dialogon. La filmo estas ĉefe en la angla sed ĝi enhavas proksimume 40 esperantajn frazojn. Mi ankaŭ sonregistris prononcan helpon por la aktoroj. Dana Alexander de Roĉestro rolis kiel la Stel-Patrino, spirita voĉo kiu parolas dum la komenco kaj fino de la filmo.

Okazis la film-prezentado la 19an de marto ĉe la Auburn Public Theater en Aŭburno (proksimume 45 km de Sirakuso). Ĉeestis spektantoj, la aktoroj, kaj esperantistoj de Sirakuso kaj Roĉestro. Kelkfoje la aktoroj misprononcis la esperantan dialogon kaj la son-kvalito povus esti pli bona. Tamen, la inkluzivo de Esperanto nepre sciigis spektantojn pri la internacia lingvo.

Daisy's Way Home estas mendebla de Ring-Tailed Lemur Productions. Sendu mesaĝon (en la angla) al *rtlemur@gmail.com*.

Mark Roberts kaj Emily Mahoney rolas kiel Prof Solo kaj Daisy Bell en sceno de *Daisy's Way Home* (foto de la filmo).

Agema Esperantisto en Roĉestro

T. Roberto Lyman, Esperanto Societo de Sirakuso

Multaj esperantistoj eklernas la internacian lingvon lastatempe, sed nur kelkaj helpas kreski ĝian parolantaron pli ol Tomaso Alexander de Roĉestro. Li parolas Esperanton dum multaj jaroj, kaj li kaj lia edzino, Dana, partoprenas en multaj esperantaj eventoj. Ili lernis Esperanton en 1997 per la dek-leciona poŝta kurso de Esperanto-USA (tiame Esperanto League for North America).

Tomaso Alexander diskutas pri Esperanto dum ARE (foto de Neil Blonstein)

Tomaso estas la estro de la Esperanto-Klubo de Roĉestro, tamen la klubo ne estas tre aktiva nun-tempe. “Karl Nell, la motoro de la roĉestra klubo dum jardekoj, mortis tri jarojn antaŭ ol mi eklernis,” diris Tomaso. “Mi revivigis la klubon dum kelka tempo.” Tomaso fariĝis kun-instruanto ĉe NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, kaj ĉi-somere li instruos la unuan fojon. Li ankaŭ kunorganizas ARE-n, la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, kiu okazas ĉiujare en Nov-Jorkio.

Kio karburas lian esperantan fajron? La okazo vojaĝi ĉirkaŭ la mondo, revo kiu ekzistas en la koro de multaj esperantistoj. “Mi neniam celis ellerni la lingvon,” diris Tomaso. “Mi volis nur provi ĝin kaj eventuale vojaĝi per Pasporta Servo. Ni trovis novajn amikojn en Esperantujo.”

Alia projekto, kiun Tomaso faras, estas lia unua serio en YouTube, *Lernu kun Logano*, en kiu li kaj lia filo, Logano, studripetas lecionojn de la dek-leciona kurso. “La ideo estis krei virtualan varieteon per Esperanto kun kantoj, skeĉoj, ĵongl-ado, ŝercoj, demandoj kaj respondoj,” diris Tomaso ambicie, aldoninte ke la serio estas “tuta kurso de Esperanto, kaj tre rapide ni akiris la reputacion kiel instruejo.” Tio estas bona laŭ Tomaso ĉar li ŝatas instrui. “Mi tamen klopodas evoluigi la varietean flankon de nia kanalo,” li diris.

Krom tiom da aferoj, kiujn li faras, li ankoraŭ trovas tempon por veturi al Sirakuso por partopreni en la renkontiĝoj de la Esperanto-Societo de Sirakuso. “Mi ne tiel ofte iras al Sirakuso, sed mi kredas ke indas la vojaĝo por subteni la movadon tie,” li diris, “kaj por montri per YouTube al la cetera mondo ke ekzistas personoj kiuj parolas Esperanton en la vera vivo.”

Tomaso ankaŭ instruas Esperanton per italki kaj estas blogisto de Transparent Language ĉe *blogs.transparent.com*. Se vi volas donaci al lia laboro, bonvolu viziti *patreon.com/EsperantoVarietyShow*.

Esperantisto de Estonio Vizitis

Timoteo Boronczyk, Esperanto Societo de Sirakuso

Esperantisto Aare Metsamärt de Estonio vojaĝas per Pasporta Servo kaj gastis kelkloke en Nov-Jorkio.

Alveninte al Novjorko la 25an de aprilo, li tuj iris per aŭtobuso al Roĉestro. Tie lin gastigis la familio de Tomaso kaj Dana Alexander. Ili ekskursis en la urbo kaj veturis al la proksima Niagara Akvofalaro por spekti la imponajn akvofalojn. Diris Metsamärt, "Roĉestro estas bela moderna urbo. Ties lago [lago Ontario] kaj parkoj plaĉas al mi. La akvofaloj ankaŭ plaĉas al mi. Mi ŝatas la naturon, sed multaj urboj domaĝe havas nur konstruaĵojn."

Metsamärt restis en Roĉestro dum tri tagoj kaj poste iris al Sirakuso per aŭtobuso. Tie mi gastigis lin. Samtempe okazis manifestacio, en kiu kelkaj esperantistoj partoprenis por montri subtenon kontraŭ tutmonda varmiĝo. Tiam li renkontis la marŝantajn esperantistojn, Ken Hynson kaj Zerbie Hynson. La ekskurso en Sirakuso ankaŭ konsistis el trinki teon en te-restoracio, promeni en la parkoj apud la lago Onondaga, kaj spekti esperantajn filmojn. Li ankaŭ renkontis lokan esperantiston, T. Roberto Lyman.
"Mi surpriziĝis pri kiom multaj junaj esperantistoj loĝas en Sirakuso. La esperantistoj en mia lando pli maljunas. Esperanto estas vere vigla ĉi tie," diris Metsamärt.

Aare Metsamärt trinkante teon en Sirakuso post la klimata manifestacio (foto de Timoteo Boronczyk).

Metsamärt forvojaĝis de Sirakuso la 30an de aprilo per trajno al Sankta Luiso. Li restos unu monaton en Usono kaj planas ekskursi en Filadelfio, Portlando (Majno), kaj Novjorko antaŭ sia hejmreveno.

Kluboj

Esperanto Societo de Novjorko
esperanto-nyc.org
estro Miko Brandini
esperantosocietyofnewyork@gmail.com

Esperanto Klubo de Roĉestro
groups.yahoo.com/EsperantoRochester
estro Tomaso Alexander
salivanto@yahoo.com

Esperanto Societo de Sirakuso
syracuseesperanto.org
estro Timoteo Boronczyk
mail@syracuseesperanto.org

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

Kalendaro

Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto Societo de Novjorko okazas la unuan sabaton ĉiumonate ĉe Caffé Bene. *meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork*

Formala renkontiĝo de la Esperanto Societo de Novjorko okazas la trian vendredon ĉiumonate (krom somere) ĉe Community Church of New York. *meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork*

Renkontiĝo de la Esperanto Societo de Sirakuso okazas la trian vendredon ĉiumonate ĉe Strong Hearts Cafe. *meetup.com/SyracuseEsperanto*

Senkrokodila Semajnfino okazos la 3an ĝis 4a de junio ĉe Norda-Suda Lago. *facebook.com/events/1854810788124214*

Paralela Universo okazos la 19an de aŭgusto. *facebook.com/groups/691599730978382*

Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto okazos la 7an ĝis la 9a de oktobro ĉe Silver Bay. *facebook.com/events/1706419916351181*